

E. L' action des catholiques dans leur milieu propre, se poursuit aussi dans la conscience des liens spirituels qui les unissent à leurs frères par le baptême, et qu' anime un même besoin et une même espérance d' unité: d' où des rencontres, des prières communes, des échanges avec les diverses confessions chrétiennes.

Quels développements à partir de ces quelques idées? Il convient tout d' abord d' y réfléchir, de se communiquer ces réflexions. Mais tout cela serait vain sans que l' action suive la pensée, sans que chacun se demande: et moi que ferai-je?

Ne perdons pas de vue notre but propre: apporter par ces actions notre contribution à la pénétration de l' Evangile parmi les hommes de notre temps, et plaçons-nous, humblement, devant Dieu pour que sa grâce rende utiles nos efforts.

R. Cl. COLAS

RESUMO

Ni invitas niajn amikojn konsideri, okaze de nia ĝenerala kunveno okazonta en Saint-Etienne, la rilatojn de nia asocio kun la multaj formoj de la Esperanto-movado. Pro tio, ni proponas kelkajn temojn por pripensi kaj agadi dum la venontaj tempoj.

En komuna spirito kun la tuta esperantaro, ni privilegiu en ni mem la sintenon de homa frateco, konscie de la multeco de idealoj, sed tolereme rilate al ĉiuj.

Pli ampleksigi la kapablon sin esprimi, uzante Esperanton parole, skribe, legante, por amikaj, turismaj, kulturaj celoj.

Reference al I.K.U.E., prepari la terenon alla servo de Eklezio, tra pastroj, klerigejoj, katolika popolo en ĉiuspecaj komunumoj, per disvastigo de la lingvo internacia en tiujn mediojn; varbi al tia tasko la katolikojn, kiuj apartenas al diversaj faktoj en la esperanta movado.

Pro la spiritaj ligiloj, kiuj koncernas ĉiujn baptitojn, preĝi kaj agi en nia komuna espero de unueco en Kristo.

Nia propra celo estas uzi ĉiujn rimedojn por la penetrado de Evangelio; ni pripensu tion, sed ĉu utilas se ni ne agadas? Dia graco firmigu niajn humilajn klopodojn!

R. Cl. C.

+++++

U.F.E. FUNEBRAS

Jean GUILLAUME, unu el la ĉefaj pioniroj de la Esperanto-movado en Franclando kaj en la internacia tereno, forpasis la 20-an de marto. Al lia familio kaj al U.F.E., kies honorprezidanto li estis, niajn elkorajn kondolencojn.

+++++

PREĜO AL DIO

Ne plu al la homoj mi turnas min. Sed al Vi, Dio de ĉiuj estaĵoj, de ĉiuj mondoj kaj de ĉiuj tempoj. Se estas permesite al malfortaj kreaĵoj perditaj en la senlimeco, kaj ne percepteblaj de la cetero de l' universo, kuraĝi peti ion de Vi, kiu ĉion donis, de Vi, kies dekretoj estas tiel neŝanĝeblaj kiel eternaj, degnu rigardi kun kompatato la erarojn ligitajn al nia naturo; tiuj eraroj ne iĝu por ni plagoj. Vi ne donis al ni koron por malami unu la alian, kaj manojn por buĉi nin reciproke. Faru, ke ni helpu unu la alian por elporti la ŝarĝon de vivo peniga kaj nedaŭra.

Tiuj, kiuj ekbruligas kandelojn tagmeze por Vin celebri, toleru tiujn, al kiuj sufiĉas la lumo de Via suno. Tiuj, kiuj kovras sian robon per blanka tolo por diri, ke oni devas Vin ami, ne malamu tiujn, kiuj la samon diras sub mantelo el nigra lano.

Ĉiuj homoj kapablu memori, ke ili estas fratoj!

Ni uzu la momenton de nia ekzisto por beni per mil diversaj lingvoj, ankaŭ Vian bonecon, kiu donis al ni tiun momenton.

+++++

NOVAJ MEMBROJ 1985

- 4) S-ino LOIRE (M & L); 5) S-ro MICHELIN (Orne); 6) S-ro SCICLUNA (Charente); 7) S-ino MENDES (S-M); 8) S-ino RACLE (Hte-Savoie); 9) S-ro BRISSOT (Essonne); 10) F-ino COUDERT (Rhône)

Al ĉiuj koran bonvenon!

PROKOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 24/2/1985 EN PARIS

Ĉeestas: P. Bourdon, F-to Marmou, F-ino Preux, S-ino Michau, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Pons, Thiollière.

Petis senkulpigon: S-ino Vincent kaj S-ro Villeneuve.

La kunveno komenciĝas per preĝo por niaj mortintoj: F-ino Y. Martinot el Troyes, S-ro J. Bernard el Lille. La tagordo estas akceptita.

St-Etienne: la programo estos sendita al la aliĝintoj.

Angers: P. Bourdon ne povos diservi; oni kontaktos P. Goudé.

Tombo Peltier: tute bone rekonstruita kaj pagita.

Informilo: presita, je dispono de la membroj.

Ekumena kongreso en Augsburg: kelkaj komitatanoj aliĝis.

Lingva angulo: reenkondukota sub alia formo.

Gazetaro: "Misi" plurfoje aperigis artikolojn pri Esp.º

S-ro Ribot perletere plendas pro mallongigo de la teksto en la de li tradukita libro "Une langue internationale pour le monde et pour l' Eglise".

Kunuloj de S-ta Francisko: marŝado de la 12-a ĝis la 20-a de julio 1985.

Banneux: pilgrimado la 2-an de sept.

Brazilo: monda fonduso por malriĉuloj, kies oficiala lingvo estas Esp.º

Lille: la librejo "Furet du Nord" vendas esperantajn librojn.

Venonta kunveno dum la kongreso en St-Etienne.

Protokolis: J. MICHAU

TOMBO DE PASTRO PELTIER

Ĝi estas tute rekonstruita en bela kaj longdaŭra granito. P. Louis Bourdon, dominikano, benis ĝin la 3-an de oktobro 1984. Vi povas legi sur la ŝtono: Pastro Emile PELTIER 1870-1909 Fondinto de "Espero Katolika", ekumena Esperanto-revuo.

La marmoristo meritas la dankojn de la gesamideanoj pro sia konscienca laboro.

La tombo kuŝas malantaŭ la monumento al la familio Soubirous, ne malproksime de la monumento al la mortintoj de la du mondmilitoj, en la malnova tombejo rue de l' Egalité.

PROGRAMO DE LA KONGRESO EN SAINT-ETIENNE

Vendredon 14-an de junio: ekde la 14.00, akcepto en Villa St-Antoine 27, rue de la Visitation

19.00: vespermanĝo

20.30: interkona vespero

Sabaton 15-an: 8.00, matenmanĝo

9.00, prezento de la temo "Karitato, fonto de paco", diskutrondoj

12.00, tagmanĝo

14.00, vizito de la urbo

18.00, diservo

19.00, vespermanĝo

20.30, distra vespero

Dimanĉon 16-an: 8.00, matenmanĝo

9.00: ĝenerala kunveno

11.30: komitatkunveno

12.00: tagmanĝo

14.00: aŭtobusa ekskurso (v. martan. numeron de FKE)

Lundon 17-an: tuttaga ekskurso al Le Puy(")

PAPAJ PREĜINTENCOJ

JULIO: por la persekutitoj pro Fido kaj Justeco

AUGUSTO: por Amo ĉiam pli granda al Eŭkaristio por la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Nairobi kaj la Eklezio en Kenjo

SEPTEMBRO: por la Episkopoj por la Eklezio en Ĉado: Paco kaj Vokiĝoj

FABELO DE KRISTNASKO ĜIS PASKO

Tiun 24-an de decembro, la sonoriloj de la bretona marborda vilaĝeto ĝoje instigis la kristanojn festi la naskiĝtagon de la Savinto. Magdalena alparolis sian maljunan edzon: "Petro, iru al la spicistejo de la Roza Salmo kaj alportu al mi, kion ni bezonas por festi Kristnaskon."

Nun la maljuna maristo ne plu enŝipiĝis al la tero-novaj benkoj. Sian emeritan tempon li pasigis kultivante ĝardenpecon kaj kiam la vetero belis, li ŝvingjetis sian fiŝfadenon laŭlonge de la kajoj. Li ankaŭ zorgis pri la aĉetoj.

La maljuna fiŝisto prenis la korbon, kiun Magdalena etendis al li kaj sin direktis al la spicistejo de la Roza Salmo. En la poŝo de lia laborjako kuŝis paŝperpeco kaj sur ĝi la listo de la alportenda provianto. Magdalena strikte kalkulis sian monon: groŝo ja estas groŝo. En la monujon ŝi metis la necesan poraĉetan sumon: per la malalta monrestaĵo li espereble povos havigi al si cigaredpaperon kaj tabakon, alumetojn aŭ kelkajn hokojn apud la fiŝkaptiloj zorge ordigotajn. Provizaĵojn li ja bezonis. Troŝpareme oni vivis, sed decisis tamen, ke oni ĝojiĝu post la noktomeza meso.

Ĉiufoje, kiam la maljuna fiŝisto venis al la Roza Salmo, li disserĉadis en la postbutiko inter la retoj kaj ŝnuregoj ekkaptontaj tiujn haringojn, kiuj iĝos fumaĵitaj samkiel tiuj, kiuj jam tie pendadis, en ĉi postbutiko. Io lin tiris tien, kvazaŭ alaŭdkapta spegulo. Patrino Nicolas, la spicistino, estis neniam sukcesinta diveni tion, kio lin tiom eklogis. Tiun kristnaskan vesperon, ŝi sentis emon rapide servi la klientojn por siavice sin prepari por festi Kristnaskon. La korbon de la maljuna fiŝisto ŝi estis superpleniginta per mielkuko, blanka buĉeno, krakenoj, eĉ botelo de bordozvino. Ĉi tiun vesperon, la tuta elspezo estis pli alta ol la enmonujigita sumo, eĉ kelkaj moneroj mankis. "Ba, la spicistino diris al si, ĝi estos ilia kristnaska donaco".

La maljuna Petro disrigardadis plue kaj subite li staradis surloke alnajlita. Patrino Nicolas aŭdis lin duonvoĉe fluŝtrantan: "Paĉjo! Paĉjo!" Inter la kalaraj manoj li tenis etan speguleton, kiu reĝendis al li la bildon de plensulkigita vizaĝo: ĝuste la redonita vizaĝo patra. Jam de tiom da jaroj la maljuna fiŝisto ne estis sin rigardinta en spegulo, ke la propran vizaĝon li ne plu rekonis, sed ŝajnis al li, ke li estas vidanta tiun de la maljuna patro, la vizaĝon de tiu paĉjo, kiu iam lin fianĉiĝis kun la maro. Trans la tempo, trans la spegulo, li ekretrovis la vizaĝon de la maljuna forpasinta paĉjo sia, de tiu, kiu en lin naskis amon al la oceano, al tiu lumblindiganta oceano ĉe la bretona marbordo post la tero-novaj nebulegoj. La ekmiro pro retrovo de la patraj vizaĝtraĵoj estis tiritinta el li tiun duonvoĉan ekkrion: paĉjo! paĉjo! Patrino Nicolas sin demandis: "Kio estas al li?" La maljuna maristo tie starasis, la spegulon kontemplanta.

"Nu, jam ne plu je via aĝo, mia knabo. Taŭgas por la junuloj, la ankoraŭ helhaŭtaj!" Petro ne respondis. Sian maljunan paĉjon li persisteme rigardadis en tiu ŝrumpita vizaĝo, kiun li kredis for por ĉiam. Mallongan tempeton li hezitis kaj diris: "Ĉu restas moneroj? - Ne; ne estis sufiĉe da. Sed... Tial, ke estas Kristnasko, ne gravas, jam sufiĉos, tiel sufiĉos jam."

La viro malheliĝis, dum li remetis la spegulon surbreten.

"Ĝin konservu, la spicistino cedis, ĝi estos via kristnaska donaco".

Petro dankodiris enŝovante la speguleton en la internan poŝon de sia laborjako. Li levprenis la pajlokorbon kaj rehejmiĝis precize ĝustatempe por iri al la noktomeza meso. Lia koro plenigadis je ĝojo, je la ĝojo de la simpluloj, simila al tiu de la paŝtistoj en Bet-Leĥem. Depost tiu tago Petro ofte solecadis. Kvazaŭ infano kulpita ĉe ia malmodesta faro, li kaŝis sin por silente kontempladi la vizaĝon de la retrovita patro. Magdalena finfine malkovris lian artifikon, sed lian sekreton ŝi ne scipovis deĉifri. "Kion do li kaŝe faracas en soleco? Ja ne povas temi pri letero: tiom mallerta li estas pri legado. Supozeble temas pri la fotado de iu el liaj eksamatinoj. Tia Johanino, kial ne?"

Kaj ŝi sin demandis, kiamaniere ekhavi ĉi tiun dokumenton. Ŝi, kiu je li dum longaj monatoj fidadis ĉiujare, kiam li veturis foren, jen ŝi tute ŝrumpita, estis ronĝata de la ĵaluzkancero.

Kune kun la kukola kanto, ekprintempis. Petro flankenmetis la laborjakon por sin varmigi sub la supradioj. Sentoj pri ĝojo kaj malĝojo miksiĝadis lia kore. Sian Magdalenan li ne plu komprenis. Li ŝin perceptis maltrankvila, angorema, foje lin spionanta. Tiumatene, malsukcese ŝvingjetinte la fiŝfadenon laŭlonge de la kajoj, li decidiĝis direkti sin al la preĝejo por peti konsilon de sia paroĥestro. Malgrasiĝadis lia edzino Magdalena, ronĝata de nekomprenebla melankolio. Petro

kiel eble plej bone konfesdonis, sin akuzante pri forgeso de la preĝoj, ke ĉefe pro tio, ke li ĉagrenis la edzinon Magdalena. "Tro ofte ni kunas, li diris, kaj estas malfacile por ŝi min toleri. Ŝi ne plu kapablas rideti kiel en la tempo, kiam ŝi akceptis min el Tero-Nova revenantan". La maljuna Petro malŝarĝis sian koron, kiun li volonte plenigis per la junaĝa amo de Magdalena. Kia bela kristnaska donaco ĝi estus! Dume Magdalena obstine esploradis tiun sekreton, kiu tiom tiklis ŝin. Depost Kristnasko ŝia koro ne plu vivis en paco. Neniam ŝia Petro, al kiu ŝi tiom fidadis konsentis sciigi ŝin pri tio, kion li faris en soleco, kaŝe rigardanta. Plurfoje ŝi surprizis lin ion reŝovantan en la internan poŝon de la laborjako, sed nenion pli ŝi sukcesis scii. Hodiaŭ ja senkompara estis la okazo. Profitante la edzan malĉeeston ŝi komencis ĉion metode traserĉadi. Unue la laborlokon, kie li ordigis la ĝardenilojn, poste la subtegmentejon, kie li sekigis la medicinajn herbojn. Ŝi melfermis la keston, kie li ordigis siajn paperojn rilate al Marŝipa Registrado - kiujn li eĉ ne scipovis legi. La tempo fluadis for, li estis baldaŭ redomiĝonta kaj daŭre senfrukta rezultis ŝia traserĉado. Kaj subite ŝi ekkonsciis, ke li eliris senjaka sub la printempa suno. Tiam ŝi malkovris tion, kio depost Kristnasko donis al ŝi tiom da zorgoj. En la interna poŝo de la laborjako ŝi trafis platan ovoforman brilan aĵeton. Ŝi zorgeme ĝin malfermis. Ŝi rigardis kaj nenion vidis krom vizaĝo de sulkiĝinta maljunulino. Ŝi nevole ridetis. La vizaĝo aliĝis kaj samtempe ŝia ĵaluzo forŝvenis. Ŝi flustris: "Jen nur tio, maljunulino!" Ena ĝojo iluminis ŝian koron kaj transfiguris ŝian vizaĝon de rideto heligatan. En tiu paska tago la fido ŝin revivigis. Ŝi reeningigis la objekton. Povus okazi, ke Petro rehejmiĝu.

Kiam li malfermis la pordon, Magdalena lin akceptis kun tia rideto de la iamaj tero-novaj revenoj. La koro de la maljuna maristo ŝvelis pro ĝojo. Li ne klare certigis, ĉu tiom varmigis lian koron la rideto de Magdalena aŭ la pastra absolvo. Ĉi tiun vesperon sonĝon li sonĝas, el kiule la tempo estas forpelita. Li estis en nuptovesto, pozanta por la rememorfoto apud la patro, kaj la lumbrileganta novedzino ridetis al li.

Iun nokton junulo sonĝis: li estis sin rigardanta en spegulo, kaj jen subite la spegulo resendis al li alian vizaĝon, tiun de Kristo. Tiam li vekiĝis kun la koro plenigita de profunda ĝojo. Longan tempon poste li komprenis la signifon de tiu sonĝo, legante el S-ta Paŭlo: "vivas jam ne mi, vivas Kristo en mi".

Nun ni vidas laŭenigme, kvazaŭ enŝpegule. Kaj S-ta Johano aldonas: "Ni vidos Dion vizaĝalvizaĝe, tia, kia Li estas. Ĝi estos la Transfiguriĝo".

Raymond RUTH (elfrancigis Simone Boniol)

+++++

ENHAVO

- | | |
|---------------------------------------|-------------------------------------|
| 1.2. Bileto de la prezidanto | 5. Bibliaj saporoj |
| 2. Preĝo al Dio | Biblia meditado |
| 3. Protokolo de la komitatokunsido | Kunuletoj de S-ta Francisko |
| Tombo de P. Peltier | La grupo de S-ta Klemento |
| Programo de la kongreso en St-Etienne | 6; Kurso de etruska lingvo |
| Papaj preĝintencoj | Lapo |
| 4. Esperanto en radio | 7.8. Fabelo de Kristnaska ĝis Pasko |
| El Pollando | 8. Kotiztabelo |

+++++

KOTIZTABLELO

IKUE kun "Espero Katolika"	75 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.	

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo)	30 F
Geedza paro	40 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj	15 F
Bonfarantoj	150 F
Dumvivaj membroj	600 F

UFE kun "Revue Française"	170 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	190 F
Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.	

+++++
 Dépôt légal: 2è trimestre 1985. C.P.P.A.P. n° 62 532
 Directeur: R.Cl. Colas. Directeur-délégués: R.J.Marmou. Polycopié par l' A.C.F.E.
 Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE